Ni Ĉiuj

Duonjara Revuo de Meksika Esperanto Federacio.

Numero 1/2009

LA GRAVECO DE LA RENKONTIĜOJ KAJ LA PAROLA PRAKTIKADO DE LA LINGVO

La 10a Meksika Esperanto Kongreso: Lingvistika diverseco en Meksiko: fundamenta parto de ĝia kulturo

POR LA HISTORIO DE ESPERANTO EN MEKSIKO

PRI LA NOVA MONERO DE KVIN PESOJ

Fidel Figueroa Martínez

Omaĝe al la Centjariĝo de la Meksika Revolucio oni eldonis novan moneron kun valoro de kvin pesoj; ĝi surdorse havas stampitan portreton de Heriberto Jara.

Jen kiamaniere tiu elstara homo rilatas kun "Ni Ĉiuj":

La esperantisto Ernesto Guerra estis desegnisto krom gravuristo laboranta ĉe la fabriko de teksaĵoj de Santa Rosa Necoxtla, Veracruz, - lulilo de nia kara lingvo-. Kelkajn tagojn de kiam li eklaboris tie, por sin distri kutimiĝis vizitadi la najbaran urbeton Río Blanco. Tie, li baldaŭ faris du bonajn amikojn precipe kaŭze de iliaj komunaj idealoj.

La unua el tiuj karaj amikoj de Guerra estis la tiama komercisto Camerino Z. Mendoza; tiu kiu poste fariĝis elstara revoluciulo. Dank' al kiu la Vilaĝo Santa Rosa nuntempe havas lian nomon; tio estas: Ciudad Mendoza.

La alia amiko de S-ro. Guerra estis Heribeto Jara, tiama librotenisto de la Fabriko de Teksaĵoj de Río Blanco, li kiu poste ankaŭ fariĝis elstara revoluciulo. Pri tiu ĉi homo oni povas legi ĉe la elektronika reto: ke Heriberto Jara naskiĝis meze de la jaro 1879 en Nogales, Veracruz, kaj mortis en la Ĉefurbo Meksiko en aprilo de 1968.

Kiam komencis la Meksika Revolucio li aliĝis al la ribeluloj kaj fariĝis Generalo. Post la venko de Francisco Madero, Jara estis Konstitucia Deputito de

1917, poste Gubernatoro de Veracruz. Lázaro Cárdenas nomis lin Prezidanto de la Partio de la Meksika Revolucio. De la Cenato, li ricevis la Medalon Belisario Domínguez; kaj de Sovetunio la Lenin-Premion de la Paco, tiam ekvivalento al Nobel-Premio.

Nu, en tiuj antaŭ-revoluciaj jaroj S-ro. Guerra, en la Ĉefurboj Meksiko kaj Puebla, krom desegnisto laboris kiel ĵurnalisto; kaj kaŭze de la artikoloj kiujn ofte li skribis kontraŭ la diktatoreca reĝimo de la Prezidento Porfirio Díaz, estis feroce persekutata kaj fine enkarcerigita. Li rakontas ke dum sia enkarceriĝo fetiĉe disponis da sufiĉa tempo por sin dediĉi al poŝta korespondado kun bonaj esperantistoj.

Heriberto Jara skribis pri tiu elstara esperantisto:

¨Ernesto Guerra estis unu el tiuj revoluciuloj apartenantaj al la Malnova Gvardio, bedaŭrinde ne bone konata ĉar li estis tre modesta homo, li neniam paradis nek pavumis por vidigi sian personon, li posedis grandan kulturon sed pli granda estis lia modesteco, pluraj el liaj artikoloj indas esti relegataj, tamen ili estas je forgeso ĉar tiuj kiuj legis ilin neniam trovis la aŭtoron por honori lin; aparte, ĉar preskaŭ ĉiuj liaj verkoj estas subskribitaj per pseudonimo¨.

Heriberto Jara aldonas: ¨Sed la intensa aktivado de Guerra ne sukcesis kaŝiĝi sub unu aŭ alia pseudonimo, ĉe kampo kie la sbira spionado de la tirana Porfirio Díaz abundis pli ol vepro; tial, lian persekuton intensigis pli kaj pli, kaj finfine estis arestita kaj enkarcerigita… sed Guerra sukcesis skapi el la karcero, tamen lia familio kaj hejmo kruele estis ruinigitaj, tiel ke li devis elpatrujigi sin¨. Liaj du amikoj: Heriberto Jara kaj Camerino Z. Mendoza enŝipigis lin al Eŭropo.

Heriberto Jara sur la nova monero de 5 meksikaj pesoj